

# EKO 2024

TRA LA  
MONDO  
IRAS FORTA  
VOKO

**Numero 2024: 44; decembro 21.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo. Sume 300 KB

## La instruista ligo havas 75-jaran historion!

ILEI estas fondita en 1949. La unua estraro konsistis el Violet C. Nixon (Britio), Einar Dahl (Svedio), Jeanne Dedieu (Francio) kaj P. Korte (Nederlando). En 1950 aperis [La Agadraporto de ILEI por 1950-51](#). Pioniro Sylvia Hämäläinen verkis: [Pri la fondo de la ILEI-Sekcio en Finnlando \(PDF\)](#).



La revuo *Internacia Pedagogia Revuo* aperis unue en 1974. La Ligo rapide tutmondiĝis, eĉ kun fondo de sekcioj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando (fondita de SMG).

En 1976 ILEI elpaŝis, kune kun UEA por la starigo de ekzamenoj, kiuj ene de kvibn jaroj akiris pli ol 500 diplomitojn. Inter la prezidantoj de la Ligo estas Edward

Symoens (Belgio), István Szerdahelyi (Hungario), Duncan Charters (Usono), Mauro la Torre (Italio), SMG, Mirejo Grosjean (Svislando) kaj Ahmad Mamduhi (Irano).

Mankas loko por detala historio; trovu ĝin ĉe <https://www.ilei.info/agado/historio.php>

Sendis la bildo: Aristophio Filho

## Biografio de Zamenhof

Okaze de la 165-a naskiĝdatreveno de Lazarj Markoviĉ 'Ludoviko' Zamenhof, *La Ondo de Esperanto* proponas (re)legi lian koncizan biografion, verkitan de Aleksander Korĵenkov ĉe

<https://sezonoj.ru/2021/12/zamenhof-14/>

## Virtuala flamo brulas, brilas kaj inspiras

Indas rigardi aliajn numerojn de la virtuala kongresa kuriero *La Flamo de Esperanto*.

<https://vk.esperanto.net/2024/img/kuriero/kuriero4.pdf>

<https://vk.esperanto.net/2024/img/kuriero/kuriero5.pdf>

<https://vk.esperanto.net/2024/img/kuriero/kuriero6.pdf>

<https://vk.esperanto.net/2024/img/kuriero/kuriero7.pdf>

Ĉiuj ĉe <https://vk.esperanto.net/2024/kuriero/>

Fernando Maia Jr. Vicprezidanto de UEA

## Universitataj pensoj

Danke al Luis Obando, spektoblas en la jutuba kanalo de UEA ([56- Kunpens\(ig\)ado pri Esperanto kaj Universitatoj](#)) la registraĵo de la kunsido, kiun gvidis Viko, kaj dum kiu parolis Longarko el Ĉinio pri sia prelego en ĉina universitato, Jorge Antonio el Kostariko pri sia okazanta Esperanto-kurso kaj diversaj motivoj de studentoj por partopreni la kurson, i.a. medi-protektaj kaj alternativaj vivstiloj, Raja, Viko kaj mi pri diversaj metodoj kaj lernolibroj por instrui Esperanton (i.a. baldaŭ aperonta ampleksa ruslingva fare de Dima kaj Anna, pri kiu ili prelegis en la VK). Estis interesa diskuto pri la okazigo de (ret)seminarioj en universitatoj por enkonduki Eo-instruadon en la universitatoj. Ĉiuj ja esprimis siajn bondezirojn por Renato kaj deziris lian resaniĝon kaj revenon en la novjara januara Kunpens(ig)ado.

Ahmad Mamduhi

## Reklamo en Hungario vidita de pli ol cent mil

Raportado pri la vivo de la verkisto István Némere altiris la legadon de 117 000 personoj inter la 16-a de novembro kaj la 3-a de decembro. El tiuj 2421 klakis sur la mesaĝo.

Informo de Láslo Szilvasi



## Onda servado

Dum 1800 sinsekvaj tagoj ekde la januaro 2020 en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. Ĝis nun neniu esperantista asocio, instanco aŭ fondaĵo subtenis ĉi tiun solan ĉiutage renovigatan Esperantan novaĵretejon. Ĝia funkciado dependas nur de la helpemo de tiuj, kiuj abonas la ĉiusezonan gazeton *La Ondo de Esperanto*. Konatiĝu kun la statistiko de la retejo kaj kun la listo de la plej legataj artikoloj ĉe <https://sezonoj.ru/2024/12/ondo-134/>

## La belga stokejo progresas

Laboroj en la nova arkivejo de Internacia Esperanto-Arkivo (IEspA) progresas. Kuirejo, necesejo kaj la incendisekuraj pordoj estas instalitaj, la muroj de la enirhalo kaj laborĉambro estas bele farbitaj kaj la unuaj mebloj alvenis. Ni laboregas por plene renovigi la ejon. Fotoj: <http://iespa.eu/index.php?ln=eo&pg=ejo>  
Eblis ektransloki la arkivaĵojn en decembro. Daŭros kelkaj monatojn ĝis ĉio estos alveninta kaj nia nova hejmo plene funkcios. Dume la arkivo kreskadas kaj estas uzata por esploroj kaj serĉadoj. Septembre anoj al la Beneluxa-kongreso vizitis la spacon, en januaro ni bonvenigos la JES-partoprenantojn. La oficiala malfermo atendos iome. Ankaŭ la ĉirkaŭaj loĝantoj povos konatiĝi kun Esperanto kaj la arkivo.

Internacia Esperanto-Arkivo vzw, (sendas Marc Vanden Bempt)

## ENHAVO de IPR 2024/4

- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- 30 jaroj, 120 numeroj (József NÉMETH, Alessandra MADELLA) p.4
- Ilona KOUTNY: Memorkonferenco okaze de la 100-jara jubileo de I. Szerdahelyi p.6
- Ilona KOUTNY: István Szerdahelyi – ĝisosta pedagogo p.8

- Zsófia Kóródy: Lerneja instruado de Esperanto en la tempo de Szerdahelyi kaj nun p.12
- Balázs Wacha: Malfruan dankon al majstro Szerdahelyi p.16
- Alessandra MADELLA: Eldoniĝis la Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23 p.18
- Ilona KOUTNY: La Interlingvistikaj Studoj en AMU finis sian agadon p.22
- Radojica PETROVIĆ: Interkulture kaj inkluzive en Beogrado p.25
- Danijela PETROVIĆ: Tra brajlo kaj muziko al la mondo p.27
- Alessandra MADELLA: Kion la Japana-Korea Kongreso alportis al instruistoj p.29
- El la landoj kaj sekcioj (BE, BI, FR, DE, CD, RS) p.32
- Henri MASSON: UNESKO kaj Esperanto p.39
- Rubeno Fernández ASENSIO: Pasinteco kaj estonteco de la Eo-kursoj en UNED p.44
- Redakciaj informoj kaj informoj pri ILEI p-48-49, 55
- La 58-a ILEI-Kongreso kaj Simpozio (LKK, Brazzabeni) p.50

## Pasis la Tago de Homaj Rajtoj

La principoj de la Universala Deklaracio restas tro ofte malobservataj, tiel ke popoloj suferas militon, malriĉon, malsanecon kaj senhejmecon, milionoj da rifuĝintoj apenaŭ eltenas sian situacion, kaj konfliktoj kaj militoj multiĝas, kune kun malobservoj de bazaj homaj rajtoj. Ni urĝe vokas al registaroj, internaciaj organizoj kaj simplaj homoj tra la tuta mondo, ke ili refortigu kaj renovigu siajn klopodojn por garantii la bazajn homajn rajtojn.

El gazetara komunikado de UEA.



## Vinilkosme tra 2024

Ĉi-jare, Vinilkosmo aperigis **ses novajn bitajn albumojn!** Spekteblas ĉe la [jutuba kanalo](#) de Vinilkosmo **ok novaj oficialaj muzikvideoj**, ne maltrafu ilin!

La jarfinfestoj alvenas rapide: ĉu vi volas plezurigi viajn Esperanto-amikojn per bonega esperanto-muziko? Se jes, bonŝance, ni havas bonegan elekton por vi.

## Montevideaj memoroj

Okaze de la Tago de la Esperanta libro, dum la tuta decembro 2024 la libroservo de UEA ofertas la enciklopedion *Nia diligenta kolegaro*, kunverkitan de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, kun sesona rabato sendepende de la mendata kvanto.

Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2024/12/ndk-12/>. Jen eĥo de la konferenco de Unesko en urugvaja komunikilo:

<https://grupormultimedia.com/70-anos-de-cooperacion-entre-la-unesco-y-el-esperanto-id142791/>

Krome, Hispana Esperanto-Federacio sendis gazetarajn komunikojn al diversaj medioj. Ĝi aperis en alternativa retejo:

<https://www.tercerainformacion.es/articulo/cultura/10/12/2024/esperanto-y-unesco-70-anos-de-colaboracion-en-materia-de-derechos-humanos-linguisticos/>

Kaj kun tiu okazo, mi mem estis intervjuita hieraŭ en radio Onda Vasca (<https://www.ondavasca.com/programas/onda-vasca-con-kike-alonso/>, kun stacioj en Eŭskio kaj Navaro), kvankam evidente mi parolis pli pri Esperanto ĝenerale.

José Antonio del Barrio, <http://www.delbarrio.eu>

Plia memoro de la Pola Radio:  
Jen ligo al elsendo ĉe [https://pola-retradio.org/.../12/e\\_elsendo-el-la-11-12-2024/](https://pola-retradio.org/.../12/e_elsendo-el-la-11-12-2024/).

La foto venis de Barbara Pietrzak, Pola Radio



**EKO je via servo: 44 en 2024**

**La nuna komuniko estas la lasta de la jaro  
Bondezirojn por jarfinaj festoj kaj 2025!**

===== vortoj: 985 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

**Juna amiko meritas vian reabonon/ekabonon!**

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

**La unuaj kvardek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.